kondukas al internacia kompreniĝo, kaj tiu - se larĝskala - favoras pacon. Reciprokaj kontaktoj de esperantistoj pere de turismo kondukas al reciproka estimo kaj toleremo malgraŭ naciaj, religiaj, ideologiaj kaj aliaj diferencoj. Tia kultura turismo konstruas novan solidarecon inter homoj kaj liveras bazon por ellaboro de formoj de kunlaboro, kiu transpaŝas la limojn de regionoj, landoj kaj kulturoj. Tiu fenomeno estas sufiĉe vasta pro la fakto, ke Esperantaj aranĝoj kutime havas kulturturisman karakteron. Tiu karaktero rezultas de la bezonoj de la Esperanto-parolantoj. La ĉefaj bezonoj de esperantistoj estas komunikado kaj ekkono de larĝsenca kulturo de popoloj de aliaj landoj.

### Bibliografio


1. *A. Grzębowski* (2011), *Esperanto en Bydgoszcz, pli ol 100 jaroj*, http://www.esperanto.bydgoszcz.eu (20.04.2011).
2. Informoj pri ArKoNes kaj Baltiaj Esperanto-Tagoj sub aŭspicioj de UEA, [en:] Gazetaraj Komunikoj de UEA, n-ro 360, http://www.uea.org/dokumentoj/komunikoj/nav gk.php?jaro=2010, (21.01.2010).
3. Informo pri Bicikla Esperantista Movado Internacia, en *Amikeca Reto*, 2002-2003, kaj *Jarlibro* de Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam, 2010.
4. Informo pri Internacia Junulara Festivalo 2010 en Internacia Kalendaro de Esperanto-aranĝoj, http://www.eventoj.hu.
5. *I. Wyszowska* (2010), *Turystyka esperancka jedną z propozycji współczesnego podróżowania,* [en:] Współczesne podróże kulturowe, red. M. Kazimierczak, Poznań.
6. *K. Buczkowska* (2009), *Kulturowa turystyka eventowa,* [en:] Współczesne formy turystyki kulturowej, red. K. Buczkowska kaj M. von Rohrscheidt, Poznań.
7. *M. Jamka* (2005), *Odkrywanie świata w zasięgu ręki*, "Multis Multum", Magazyn Studencki WSZIB, Kraków.
8. *M. von Rohrscheidt* (2008), *Turystyka kulturowa. Fenomen, potencjał, perspektywy*, Gniezno.
9. *M. von Rohrscheidt* (2008), *Turystyka Kulturowa – wokół definicji.* Interreta revuo: www.turystykakulturowa.org, n-ro 1/2008.
10. *W. Gawarecki* (1997), *Turystyka*, Warszawa.


### Adreso de la aŭtorino


*D-rino Dorota MĄCZKA*
*ul. Mlynarska 22/28*
*PL 08-110 Siedlce* / POLLANDO <dorciapoczta@op.pl>


### Priaŭtora informo

La aŭtorino estas doktorino de historio, lekciistino pri historio de arĥitekturo, arto kaj kulturo en la Instituto de Turismo de la Ŝtata Supera Lernejo de *Biała Podlaska*, Pollando. Krome, kiel ĉiĉeronino, ŝi interesiĝas pri historio kaj kulturo laŭ turisma aspekto. Ŝi publikigis du librojn kaj kelkdek artikolojn.



## Klasika muziko dudekajarcenta

*Franz-Georg RÖSSLER*

Parolante pri "moderna muziko", en amasa socio kiel la aktuala oni devas klarigi, ke, apud la daŭre radie, televide kaj koncerte disvastigata populara muziko nuntempa, ekzistas kontinue la daŭrigado de la "akademia, serioza, klasika" muziko en la sekvo de la konataj korifeoj kiel *Palestrina, Schütz, Bach, Mozart, Beethoven, Schubert, Wagner, Verdi* ktp. La nunaj reprezentantoj de tiu ĉi branĉo plej ofte estas profesoroj en muzikaltlernejoj kun bonaj kontaktoj al muzikdisvastigaj institucioj kiel radiostacioj, orĥestroj kaj eldonejoj.

### *Hans Vogt* – reprezentanto de la "Nova muziko"

Unu el tiuj komponistoj estis *Hans Vogt*, germano, kiu naskiĝis la 14an de majo de la jaro 1911 en *Danzig* (tiam Germanujo) ekzakte antaŭ unu jarcento, kaj mortis la 19an de majo en la jaro 1992. Laŭ ties profesia evoluo oni povas traspuri la defiojn, problemojn kaj ŝancojn de muzikkreanto de lia generacio.




*Vogt* post la studado en Berlino / Germanujo fariĝis dirigento, oficante ĉe diversaj orĥestroj kaj operejoj. Intervenis la Dua mondmilito, kiun li ja transvivis, sed devis postvivi en sovetiaj kaptitejoj ĝis 1949. Reveninte li translokiĝis al la Suda Germanujo kaj fariĝis docento – poste profesoro – ĉe la Muzikaltlernejo Manhejmo-Hejdelbergo. Altlerneje li deĵoris kiel instruanto de la muzikteorio kaj de la komponado. Apude li abunde komponis mem kaj elverkis – krom aktualajn artikolojn kaj prelegotemojn – du "normigajn librojn", nome *"Neue Musik seit 1945"* / "Nova muziko post 1945" kaj "La ĉambromuziko de *J. S. Bach*", kiuj aperis en la renoma eldonejo *RECLAM*. Aldone li estis la fondinto de la "Asocio por Nova muziko Manhejmo" kaj ties longajara organizanto. Pere de tiu ĉi in-

stitucio li havigis al la regionanoj en koncertoj kaj prelegoj kontinuan kontakton kun la aktuala "serioza" muziko kaj kun ties mondkonataj elstaruloj. Jam en 1933 *Vogt* ricevis en Berlino pro sia ĥoralmoteto por du kvinvoĉaj ĥoroj pri "*Ach Gott vom Himmel, sieh darein*" / "Ho, Di' ĉiela, implikiĝu" la "Premion *Mendelssohn*". Sekvis ĝis en la lastaj jaroj multaj aliaj publikaj honorigoj.

**Situacio de komponisto post la Unua mondmilito**

Fine de la Unua mondmilito finiĝis – krom kelkaj specifaj personoj kiel *Richard Strauss*, *Hans Pfitzner*, *Franz Schmidt* – la influo de la romantikismo. Komenciĝis nova erao kun rezolute kontraŭromantikaj komponistoj, kiuj volis superi la grandiozecon kaj emociemon de la antaŭa epoko kaj skribi pli elastan, pli "racian, novan, modernan" muzikon sen la katenoj de la muzikhistorio kaj kun nova estetiko. Unuecon ili tamen ne celis. Kaj la proverbo scias, ke "Nenio nova sub la suno!" La tri bone distingeblaj grupoj do tamen havis siajn radikojn, siajn retroligojn, malgraŭ la asertataj revoluciemo kaj modernemo.

*Arnold Schönberg, Alban Berg* kaj *Anton Webern* organizis siajn verkojn per striktaj reguloj kaj strukturoj. La rezulton oni nomas *"Zwölftonmusik"* / "Dekdutona muziko" / "Dodekafonio". Ties neneataj fontoj estis la kromata muziko de *Richard Wagner*, nun rigore strukturata.

*Paul Hindemith* komencis kiel *"Bürgerschreck"* / "Timiganto de la burĝoj", sed baldaŭ, same kiel *Igor Strawinski*, fariĝis *"Neoklassizist"* / "Novklasikulo", do komponisto ja inventinta novajn sonojn, sed evidente sekvanta elpruvitajn modelojn.

La hungaro *Bartók Béla* uzis melodiojn kaj strukturojn de la kamparana muziko de sia regiono. Sed tion faris ja jam pli frue la norvego *Grieg* kaj la ĉeĥoj *Smetana* kaj *Dvořák*.

**Juna komponisto en la tridekaj jaroj**

Influe de tiuj tri grupoj juna komponisto en la tridekaj jaroj tamen ne povis adapti sin nur al iu abstrakta sistemo, kiu plej konvenis al li. Li devis konsideri ankaŭ la socian vivon ĉirkaŭ si, la politikon. *Hindemith* ja havis siajn problemojn kun la nazioj, sed, kiel jam establiĝinta interpretisto kaj komponisto, povis eskapi al Usono. La junuloj kiel *Hans Vogt* devis serĉi sian vojon sen scii la



efikon, kio estas la privilegio de postaj generacioj. En la tridekaj jaroj *Vogt* skribis la verkon "Suito laŭ germanaj popolkantoj por granda orĥestro", kiu certe ne emociis la kulturpolitikistojn de la tiama germana registaro. Ke li entute ne postkuris profitemule la tiamajn politikajn fluojn, pruvas la jam menciita premio laŭ la nomo de juda komponisto, pro religia verko. Profesie li povis labori kiel dirigento ĝis la neevitebla armeaniĝo, kiu kostis al li ses vivojarojn.

**Komponisto post 1950**

Post la Dua mondmilito, grupo de tre rigoraj dodekafonistoj kapablis superi la konkurenculojn, akiris la gvidan pozicion en konferencoj kaj radiostacioj. *Hans Vogt* ne adaptis sin al tiuj ĉi tendencoj. Li daŭre disvolvis sian stilon inter la formaj postuloj de la novklasikistoj kaj la melodiaj/akordaj akiraĵoj de la novfolkloristoj. Kaj li ne neglektis la strukturajn ekkonojn de la *Schönberg*-skolo, sen ia strikta postsekvado. Por tiel diri, li plenumis mezan linion inter la ekstremoj.



**Bildo 1:** La aŭtoro kun *Hans Vogt* (dekstre)

Tiel li ĝuis publikan aprecon, se oni povas nomi "publiko" la iom elitan aron de ŝatantoj de "Nova muziko". Eldoniĝis liaj verkoj en eldonejoj, okazis multaj koncertoj kaj radiaj disaŭdigoj. *Vogt*, same kiel multaj kolegoj el lia generacio, estis agnoskita aktuala komponisto, kiu postlasis verkon indan je pluaj aŭskultado kaj konsiderado. Sian artan koncepton *Vogt* formulis tiel: "Muziko ne estas materio destinita por servi al bezonoj de la merkato aŭ de ideologioj. Kontraŭe, ĝi estas vivesprimo *"sui generis"* / "de propra kategorio", nome de la estetika, kaj ĝi montras ĉiujn ecojn de organisma funkciado."

## Postparolo

*Franz-Georg Rössler* (R.) studis muzikteorion kaj komponadon ĉe *Hans Vogt*. Li verkis dokumentaron, artikolojn kaj broŝurojn pri li. Pere de *Vogt* la Asocio por Nova muziko *Mannheim* mendis ĉe R. la komponadon de nova ĥorverko, kion tiu plenumis per la peco "Evoluo" en la lingvo Esperanto. La verko gajnis la unuan premion dum la Germana ĥorkonkurso en 1993.

R., orgenisto, petis de la iama profesoro pecon por sia instrumento. *Vogt*, mem ne orgenisto, hezitis, ĉar li sentis sin nekompetenta por tiu ĉi muzikilo. Bedaŭrinde li mortis en 1992 sen transdono aŭ plia mencio de orgenopeco.

**Kanon zu 3** *(Hans Vogt)*




Post monato tamen atingis R. koverto kun du orgenomuzikaĵoj. La filo de *Vogt* skribis, ke li sur la piano de la patro trovis tiujn verketojn, inter ili (la apudan) "Kanono je 3", evidente por R. faritajn. Laŭ la datoj ili ŝajnas esti la lastaj finitaj komponaĵoj de la komponisto – vera saluto trans la morton.

**Adreso de la aŭtoro**
*Franz-Georg* RÖSSLER
*Am Mönchsbusch 6*
*DE – 67373 Dudenhofen* / GERMANUJO
<rozsas@web.de>

**Priaŭtora informo**
La aŭtoro naskiĝis en 1949, estas instruisto pri muziko kaj geografio. Komponas, verkas, prelegas.



# Ĉu Turkoj povas lerni Esperanton?

## – Akordo en la simpla determinita substantivo de 6 hindeŭropaj lingvoj laŭ turka vidpunkto –

*Gerald* TUCKER

Pritraktinte la adjektivon kaj artikolon de ses hindeŭropaj lingvoj el la vidpunkto de nehindeŭropa (turka) lernonto en ĉefe paradigma maniero, ni nun aliros sintagmon: la determinitan substantivon.

La sintagmo* estos limigita al la tri ĝis nun prilaboritaj kaj supre menciitaj unuoj, kvankam la substantivo estas determinata de pluaj unuoj, ekz. posesivaj adjektivoj. Tamen, ĉi tiuj apartenas al sufiĉe komplika fenomeno poste prezentota en konekso kun la turka genitiv-posesivo. La tri elementoj tamen sufiĉas por demonstri la sintagmajn rilatojn* en la akordo inter la substantivo kaj ĝiaj determinantoj adjektivo kaj artikolo. Limiginte la pritraktotan sintagmon al la tri elementoj **substantivo** kaj la determinantoj **artikolo kaj adjektivo**, ni povas alpaŝi la interlingvan komparon.

Elirante, kiel ĉiam en ĉi tiu studo, de la turka lingvo, ni konstatu la strukturon de la sintagmoj de la unuopaj lingvoj. Unue pritraktiĝos nur la *epiteta* adjektivo singulara.

Kun la escepto de la **rusa**, ĉiuj lingvoj de la studo havas po du sintagmojn de la determinita substantivo.

Pro tio ke la **turka** havas nur nedifinan kaj Esperanto nur difinan artikolon, nur unu sintagmo havas ĉiujn tri elementojn.

La vicordo de la elementoj de la turka determinita substantivo estas: (epiteta) adjektivo – (nedifina) artikolo – substantivo.

Paradigme la turka singulara epiteta determinita substantivo havas jenajn formojn:

---

* Noto: Pri la termino "sintagmo" kaj pri "paradigmaj kaj sintagmaj rilatoj" vd. *Herbst / Stoll / Westermayr, "Terminologie der Sprachbeschreibung ein Lernwörterbuch für das Anglistikstudium", p. 21, 1991, Forum Sprache, Max Heuber Verlag, Ismaning*